

Bulgara ESPERANTISTO



E N H A V O

* * *	Glora jubileo	1
* * *	Komuniko de CK de BEA	2
A. S. Puŝkin.	Al Caadaev. Traduko de <i>Klara Rabinoviĉ</i> . .	3
Kristina Aleksova.	Mi ĝisvivis	3
Stefan Sokolov.	Memore al Trifon Ĥristovski	4
L. B.	Literatura vespero	5
G. Cvetkov.	Nova E-societo	5
Minko Conkovski.	Estimo al la pereintoj por la popola libero	6
Ginka Popova.	Aktivas la uzina societo „Progreso“	6
Vera Văjarova.	Agrabla kaj utila ekskurso de esperantisto	7
Marin Băcev.	Nova estraro de IUEF	7
* * *	Esperanto en la bulgara gazetaro en 1973 j. . . .	8
Haim Levi.	La socialisma ekonomia integriĝo kaj ĝia rolo por la plifortigo de la ekonomio de PR Bulgario . . .	9
* * *	La naturo — artkreanto. Intervjuo kun Dimităr Denĉev	11
* * *	Komuniko de la Akademio de Esperanto	12
Marin Marinov.	La 26-a IFEF-kongreso	13
Prof. d-ro St. Ĝuĝev.	Eduko de la orelo. Mekanismo de la elparolo (daŭrigo de n-ro 5)	14
* * *	„Verdaj steletoj“. Materialoj el „Informado el Vjet- namio“	16
Marin Băcev.	Vortplektaĵo	III
Televida filmo	priesperanta en Pollando.	IV
Tra la gazetaro		IV

Sur la kovrilpaĝo:

Grupo de esperantistoj antaŭ la busto-monumento de la glora
partizana komandanto-esperantisto Diĉo Petrov apud v. Batulija
(Vd paĝon 6.)

*Abonkotizo: jara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dola-
roj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Ru-
manio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta nu-
mero — 0,14 lv.*

*Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adreŝoj — publikigataj senpage.*

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Carducci 32,
Padova.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205,
Bukureŝti 1.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang
P. O. kesto 16.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika,
D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Mos-
kva V—449

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**GLORA JUBILEO**

Antaŭ 25 jaroj en Parizo laŭ iniciato de famaj personoj — Anna Se-ghers, Pablo Neruda, Jorge Amado, Martin Andersen Nexø, Romain Rolland, Paul Eluard, Irene kaj Frederic Joliot-Curie — okazis tutmonda packongreso, kiu aprobis Manifeston por Pacbatalo. Tiun unuan postmilitan kongreson partoprenis John Bernal — eminenta angla sciencisto, la rusa verkisto Aleksandr Fadeev, kies famiginta tragediano kaj samtempe lirika romano „Juna Guardio“ oni tralegas unuspire. Apud li sidis la konata dana verkisto Martin Andersen Nexø, la negra kantisto Paul Robeson, la glora ĉilia poeto kaj batalanto por libereco Pablo Neruda, la digna filo de Hindio Mulk Raĝ Anand kaj multaj aliaj elstaraj sociagantoj el 72 ŝtatoj.

La unua postmilita kongreso komencis sian laboron en granda koncertsalono. En ĝi klare sonis la voĉo de la grizhara Louis Aragon, kiu legis la tekston de la Manifesto. Ĝi sonis kiel furo de mil sepcent okdek kvar delegitoj.

„La tutmonda kongreso de pacdefendantoj deklaras, ke la konservo de la paco estas devo de ĉiuj popoloj en la mondo. En la nomo de publikaj organizoj, kiuj unuigas sescent milionojn da geviroj, ni turnas nin al ĉiuj popoloj sur la tero kun la alvoko: „Batalu kuraĝe por la paco!“

Joliot-Curie deklaris: „Ni devas malebligi uzadon de atomenergio por detruceloj! Nia strebo al paco devos esti ne pasiva. Ni devas montri la militdangeron al tiuj, kiuj ĝin ankoraŭ ne vidas. Al la militpreparantoj ni diras: vi devas konsideri nian opinion!“

La kongreso okazis iom post la subskribo de la Nordatlantika Kontrakto, kiu minacis la homaron per nova milito. Necesis urĝe bari la vojon de la militbriligantoj.

La francaj pacbatalantoj sendis publikan leteron al la usona prezidento Trumeno, en kiu oni protestis kontraŭ la Nordatlantika Kontrakto kaj nomis ĝin „militpakto“.

Italaj antifaŝistoj vizitis la tombojn de kamaradoj pereintaj en la batalo kaj metis florkronojn kun dediĉo: „Ankaŭ vi neis la Nordatlantikan pakton!“

En Anglio junaj patrinoj demonstris kun siaj suĉinfanoj kaj portis afiŝojn, sur kiuj estis skribite: „Reduktu la armilojn, sed ne la viandporciojn!“

La deputito de la brita parlamento Ziliakus emocie deklaris antaŭ la kongreso: „Mi partoprenis la Unuan Mondmiliton. Miaj filo kaj bofilo partoprenis la Duan Mondmiliton. Mi ne povas permesi, ke miaj nepoj transformiĝu en atoman polvon!“

La juna francino Raymond Dien jetis sin sur la relojn por haltigi vagonaron transportantan tankojn al Vjetnamio, kiu tiutempe estis franca kolonio.

La dokistoj en Nico renversis en la maron raketlanĉilojn, destintajn por militado en Alĝerio.

La usonaj veteranaj brave batalis kontraŭ la krima milito en Hindoĉina Duoninsulo.

Ĉiuj ni memoras, ke la pacaktivuloj kolektis milionojn da subskriboj por malpremo de la nukleaj armiloj.

Nova venko de la pacmovado estis la pasintjara kongreso en Moskvo. Tiu kongreso estis plej amasa kaj reprezenta. Ankaŭ la Mondpaca Esperantista Movado estis inde reprezentita tie per internacia delegitaro. La prezidanto de MEM N. Aleksico estis elektita en la prezidantaro de la Mondkonsilio de la Paco. Li partoprenis ankaŭ la celebron de la 25-jara jubileo de la mond-paca movado, okazintan en Parizo la 26-an de majo. Tre favore rilatas al MEM la ĝenerala sekretario de la Mondpaca Konsilio s-ro Romesh Chandra. Tio pruvas, ke la rolo de MEM estas alte taksata de la gvidorganoj de la mond-paca movado.

Nenio estas tiel parenca kiel paco kaj Esperanto. La aŭtoro de nia lingvo Zamenhof jam dum la Unua Mondmilito penis meti la Internacian Lingvon en servon de la paco. Tiutempe Zamenhof tamen precikis en dezerto. Nun kiam ekzistas socialismaj kaj pacamanaj ŝtatoj plus amasaj pacmovadoj diverstendencaj, Esperanto povas esti tre utila kiel interkomprenilo. Se ĝi ankoraŭ ne estas tia, kulpas iugrade iuj gvidantoj de la E-movado, kiuj timas la pacmovadon. Estas bedaŭrinda fakto, ke oni obstaklas la agadon de MEM.

Malgraŭ tio MEM daŭrigas sian porpacan laboron en la E-movado. Kaj ni deziras al ĝi novajn sukcesojn kaj adeptojn por la tono de nia Esperanto-movado.

Ankaŭ estonte la bulgaraj esperantistoj arde subtenos la fonditan de la karmemora Antonio Balague Mondpacan E-movadon.

For la imperiistajn militojn!

Vivu la mond-paco!

Okaze de la recenzo de Emilija Lapenna pri la libro „LA SEPTEMBRA RIBELO“, publikigita en „La Suda Stelo“, n-ro 4—5, 1973

La faŝismo, kiel plej reakcia politika doktrino kaj movado, aperis en 1919 en Italio kaj Germanio. En 1922 la faŝistoj okupis la ŝtatan povon en Italio kaj en 1933 — en Germanio. La 9-an de junio 1923, rezulte de oficira-faŝista puĉo, ankaŭ en Bulgario starigis faŝista reĝimo. Ĝuste kontraŭ tiu ĉi reĝimo en septembro 1923 eksplodis ribelo. Ĝi estas la unua ribelo en la mondo, direktita kontraŭ la faŝismo ne nur kiel politika fluo, sed ankaŭ kiel ŝtata povo. Oni ne devas intermiksi tiun ĉi ribelon kun la perarmilaj bataloj, kiujn la laboruloj en Jugoslavio kaj en multaj aliaj landoj, inkluzive Bulgarijon, kondukis kontraŭ la reakciaj burĝaj reĝimoj sub la influo de la venko de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. Temas ne pri la ajn ribelo, sed pri ribelo, direktita kontraŭ faŝista reĝimo. En septembro 1918 en Bulgario eksplodis soldata ribelo, direktita kontraŭ la monarkismo kaj la reganta reakcia burĝaro. Neniu iam ajn kaj ie ajn tamen nomis tiun ĉi ribelon anti-faŝisma. La kaŭzo pri tio estas la cirkonstanco, ke ĝi ne celis renversi faŝistan reĝimon.

Canko Murgin en la antaŭparolo uzis juĝon pri la ribelo en Bulgario dum septembro 1923, adoptitan en la internacia historia scienca literaturo. Tial ni miras, ke la redakcio de la „Suda Stelo“ montris en la kazo tian neinformitecon.

CK de BEA



175 jaroj ekde la naskiĝo
de A. S. Puŝkin

AL ĈAADAĖV

de A. S. Puŝkin

La am', la famo kaj espero
nelonge trompe tentis nin;
junec-amuzoj malaperis
nebule kiel song-fein'.
Sed plu ni ardas de pasio,
fatala premas nin potenc';
l' animoj kun malpacienç'
alvokon aŭdas de l' patrio.
Atendas ni esper-sopire
momenton sanktan de liber',
kiel renkonton de tener'

amanta juna kor' aspiras ...
Dum brulas ni pro libervol',
dum vibras kor' honestoriça,
al la patri', al la popol'
impetojn bonajn ni dediçu!
Ho, kredu min: levigos stel',
la stelo rava de l' feliço,
klariĝos de Rusi' ciel',
l' aŭtokratio ruinigos,
kaj nin memoros nia ter'!

El la rusa: Klara Rabinoviç
Ĥarkov

MI ĜISVIVIS

de Kristina Aleksova

— Panjo, morgaŭ mi kuniros por labori en brigado!

— Por mi tio estas rekompenco, infanino mia!
Revis mi survoje, ke mi iru ankaŭ,
ke por la feliço, por la ĝojo ankaŭ mi laboru.

Jam la strat' vekigas. La mallum' ankoraŭ restas,
ĝi ne volas morti, tamen ĝin elpuŝas pli kaj pli la taga lumo.
Tramoj, aŭtobusoj en dormemo palpebrumas.
Antaŭ nia pordo furioze brueganta kamiono haltas
plena de junuloj — vera florbukedo.
Ili sin direktas al la kort', al la filino.
La silenton de l' mateno rompas vigla gejunula kanto.
En la gaja bruoj sin aŭdigas hela voço.

Vanja vokas:

— Ni rapidu, kamaradoj! Ni malfruas!

La laborbrigado jam ekiris semj novajn semojn.

Iru vi, infanoj miaj! Vin atendas la tagmezo varma.
Festu pri la jubileo de l' patrujo!

Goju pri feliço ĝia.
Festu la atingojn glorajn de l' tridekjariĝo!
Iru al la pli feliça kaj pli riça estonteco,
al la paca, senmilita mondo —
al la revo de l' homaro — al la komunismo!
Mi ĝisvivis. Mi atendas la revenon de l' brigado.
Mi aŭskultas la rakonton pri la belaj travivaĵoj,
pri l' labora konkurado,
pri la belaj noktaj fajroj,
pri la dancoj

kune kun junuloj el la tuta mondo:

blankaj,

nigraj,
flavaj ...
Rev's mi estiĝi ree juna, povi partopreni la brigadon ...
Nu, la revo plenumiĝis ja per vi, junuloj miaj!
Nun kun vi mi ĝuas la feliĉon vivi en ĉi tiu tempo,
vivi en beleĝa, fruktodona patrolando nia,
aŭdi pri la herooĵoj de la laboruloj bravaj,
kaj rigardi kun trankvila koro
al la pacaj tagoj de l' estonto!

ORGANIZA VIVO

MEMORE AL TRIFON ĤRISTOVSKI

La 18-an de majo la salono de la kulturdomo „Trifon Ĥristovski“ en vilaĝo Radotina, Sofia Distrikto, estis plenplena. Cento da vilaĝanoj el Radotina kaj multaj gastoj el Sofio, Botevgrad kaj la proksimaj vilaĝoj kolektiĝis por celebri solene la memoron de la patrono de l' vilaĝa kulturdomo, la elstara bulgara publicisto kaj sociaganto Trifon Ĥristovski. Inter la gastoj estis ankaŭ prof. Stojan Mihajlov — gvidanto de fako „Propagando kaj Agitado“ de CK de la Bulgara Komunista Partio, Ĥristo Ĥristov — vicprezidanto de la Distrikta Popola Soveto, Nikola Aleksiev — prezidanto de la Bulgara E-Asocio kaj de Mondpaca E-Movado (MEM), la konata

poeto Ivan Burin.

La sorto de Trifon Ĥristovski estas unika. Naskita en malriĉa kamparana familio, li estis trafita de granda malfeliĉo antaŭ ol aĝi unu jaron. Trifon malsaniĝis de poliomjelito kaj restis kripla je ambaŭ kruroj kaj unu brako. Atinginte 7-jaran aĝon, li komencis viziti lernejon, portata surdorse de sia avo en daŭro de unu jaro. Kaj jen: kripla kaj preskaŭ analfabeta, kun unuaklasa instruiteco, sed kun forta volo, li aŭtodidakte ellernis perfekte sian gepatran lingvon kaj Esperanton kaj per aktiva partopreno en la komunista movado elkreskis kiel granda publicisto. Lia libro „Mia vivo“ (pli ol 200-paĝa) verkita dum tri monatoj kaj finita nur dekon da tagoj antaŭ lia morto, trovis vastan akcepton inter la bulgara legantaro — precipe inter la junularo. Ĝis nun ĝi aperis en kvar eldonoj.

Dum la solena kunveno raporton pri la vivo kaj la agado de Trifon Ĥristovski faris Ĥristo Ĝambazov, literaturisto, lia amiko kaj kunaganto. Vasta loko en la raporto estis dediĉita al lia por- kaj peresperanta agado: aktiva korespondado kun centoj da esperantistoj el 37 landoj, kunlaborado al kelkaj dekoj da gazetoj, inter kiuj ankaŭ Esperantaj.

Rememorojn pri Ĥristovski rakontis Nikola Aleksiev, kiu havis skribajn kaj personajn kontaktojn kun li en daŭro de pli ol 15 jaroj. Liaj rememoroj estis tre interesaj, saturitaj per faktoj pri la praktika aplikado de Esperanto fare de Ĥristovski.



Rememorojn rakontis ankaŭ la poeto Ivan Burin, kiu recitis siajn versojn ligitajn kun la nomo de Hristovski.

La vicprezidanto de DPS Hristo Hristov donacis al la kulturdomo grandan portreton de Trifon Hristovski (Vidu paĝon 4).

La aktorino Vera Kovačeva el la vokala trio „Orfej“ kaj esperantistoj plenumis riĉan belartan programon.

La sekvan tagon la gastoj el Sofio vizitis la domon de Hristovski, transformitan en muzeon. La adorklinigon antaŭ lia tombo partoprenis ankaŭ dekoj da vilaĝanoj. Tie paro'is Nikola Kānev — el la Ministerio de la Popola Instruado, kaj Aleksandr Dikov — direktoro de gimnazio en Sofio. En la nomo de BEA estis prezentita florkrono.

Stefan Sokolov

LITERATURA VESPERO

Ĉiam estas agrable troviĝi en sia medio. Tiam la humoro estas plej gaja, la koroj — plej sincere ĝojaj, la amikeco — plej forta.

Tia estis la renkontiĝo inter la esperantistoj el la Sofia Literatura Rondo kun la samideanoj el nia bela karbindustria urbo Pernik. La 20-an de majo la sofianoj vizitis ilin por prezenti sin kun siaj verkoj. La renkontiĝo okazis en la plej bela konstruaĵo de Pernik — la Sindikata Domo.

Kun ĝojo oni konstatis, ke la renkontigon partoprenis ankaŭ samideanoj el Radomir kaj klaso da lernantoj el v. Temelkovo, kiu lernas eksperimente Esperanton laŭ la decidoj de la III Kunordiga Konferenco en Maribor. Ĝin gvidas la instruistino Cvetanka Zareva.

La atmosfero estiĝis alloge amika, kiam la Vespero estis malfermita de k-dino Rajna Arnaudova el la Sofia Rondo. Post la malfermiĝo la prezidanto de la Sekcio de Esperantistoj Literaturistoj en Bulgario (SELEB) k-do Asen Grigorov informis pri la agado de la Rondo, pri bonaj sukcesoj

kaj ĉe la fino prezentis la ĉeestantajn rondanojn al la multnombra publiko.

Vigle eksonis la Esperantaj kantoj de la lernantoj el v. Temelkovo, ofte akompanataj hore de la tuta aŭditorio.

Komenciĝis la literatura legado. Unua prezentis sin L. Bojaĝieva per du versaĵoj — „Marina“ kaj „La voĉo de Lenin“. Sekvis Vera Văjarova, kiu recitis du radukaĵojn de As. Grigorov — „La Kolombo de Pikaso“ de Al. Muratov kaj „Malproksime“ de Vătju Rakovski. Văjarova interpretis ankaŭ originalan prozaĵon de Nevena Nedelčeva — „La dumila jaro“. Tre konvinke eksonis la versaĵo de Stojan Kostadinov „Alloga lumo“, recitata de Văjarova. Agrable estis variigita la programo per pianludo de kelkaj muzikaj fare de Penka Batoeva, kiu poste tralegis sian rakonton „La unuaj kortremoj“. Asen Grigorov estis prezentita ankaŭ per sia iama versaĵo „Mia kanto“, originale verkita en Esperanto, kiun tre esprimplene recitis Rajna Arnaudova. La literatura vespero finiĝis per kompozicio el du versaĵoj de L. Bojaĝieva — „Por la feliĉo“ kaj „La nemezurebla“, akompanataj de surbendigitaj motivoj el „Simfonio“ de Veselin Stojanov. La kompozicion plenumis nia juna recitantino Ĵorĵeta Zdraveva, kiu gajnis la simpatiojn de la aŭskultantoj per sia kortuŝa kaj emocia recitado.

Longe post la fino de la literatura legado la esperantistoj el Sofio kaj Pernik ne povis disiĝi. La promeson de nove renkontiĝi, donitan reciproke, ili plenumos nepre kaj kun granda plezuro.

L. B.

Nova Esperanto-Societo

La 23-an de marto 1974 en urbo Varna fondiĝis nova E-societo — en la Ŝiprapara Uzino. Ĝi ricevis la nomon „Nigra Maro“ kaj havas 9 membrojn. La nova estraro: prezidanto Nikola Kostov, sekretario Maria Vladimirova, kasistino Anka Dimitrova.

La fondo de Societo „Nigra Maro“ estas sekvo de sukcesa E-kurso en la uzino, gvidata de Stefan Apostolov.

G. Cvetkov



La 2-an de junio ĉ. j. en la balkanmontara vilaĝo Batulija, je 30 km de Sofio, okazis granda celebropo lige kun inaŭguro de monumento memore al la 12 partizanoj el la Unua Soldata Partizana Bataliono „Hristo Botev“, pereintaj batale en la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo la 23-an de majo 1944.

Grupo de esperantistoj el Sofio (civitanoj kaj gelernantoj de 28-a Meza Politeknika Lernejo „Konstantin Veliĉkov“ kun sia gvidantino Ivanka Ŝavĉeva — instruistino (esperantistino el la sama lernejo) kaj u. Samokov partoprenis la solenan inaŭguron kun Esperantlingvaj sloganoj.


Pri la heroaj bataloj de bataliono „Hristo Botev“ parolis antaŭ la kelkmila mitingo generalo Trifon Balkanski, ekspartizano el la sama bataliono. K-do Venelin Kocov, kandidat-membro de Politburoo de CK de BKP, malkovris la monumenton, solene tranĉante la rubandon.

Post la mitingo la grupo de la esperantistoj iris al la loko, kie okazis la batalo inter la bataliono kaj la faŝista ĝendarmaro, 4 kmn ekster la vilaĝo. Sur herbejeto meze de arbaro staras blanka busto-monumento de la pereinta tie ĉi komandanto de la bataliono Diĉo Petrov — popola instruisto kaj fervora esperantisto. (vd. la kovrilpaĝon).

Petata de la esperantistoj, la popola generalo Balkanski speciale venis kaj surloke rakontis pri la longa bataliro de la bataliono, pri ĝia peza batalo ĉi tie kontraŭ multoble pli granda kaj moderne armita malamiko. Tre detale, kun profunda amo kaj vervo li parolis pri sia ekskomandanto Diĉo Petrov. La esperantisto emocie atentis la vortojn de la generalo pri la fidela popola heroo kaj esperantisto.

Pri lia vivo kaj esperantista agado parolis ankaŭ Kunĉo Vălev.

Minko Conkovski



Sub la slogano „Esperanto en servo de la paco, la progreso kaj la tekniko“ pasis la jarkunveno de E-societo „Progreso“ en la Uzino por Ŝarĝaŭtomobiloj en u. Sumen. La kunvenon partoprenis ankaŭ gastoj: Angel Daĉev — vicsekretario de la uzina komitato de BKP, Stojanka Ljubenova — sekretariino de la uzina sindikata komitato, Zora Jankova — vicsekretariino de la uzina komitato de Junkomunistoj Unuiĝo.

La jarkunveno estis samtempe iagrada jubilea festo. Ja pleniĝis 10 jaroj da vigla E-agado en la uzino. Pro tio en la raporto de la prezidantino Rajna Stanĉeva ne mankis informoj ankaŭ pri delonge pasintaj agoj. La uzinaj sekcioj de la urba E-Societo „Vekigo“ fondis en 1964 j. Asen Doĉev, Ilija Andreev, Cvjatko Todorov, Borka Mirkova, Jordan Todorov k. a. En 1968 la sekcio transformiĝis en memstaran E-Societon „Progreso“, kiu vigle agas. Ĉiujare funkcias kursoj, la membraro atingis la nombron 42. La societa estraro iniciatis fondon de Internacia Klubo en la kadro de la Uzina Kulturdomo. Pere de la interklubo la uzinaj esperantistoj kontaktiĝis kun similaj kluboj en Szczecin kaj Stalowa Wola — Pollando, Debrecen kaj Szeged — Hungario, Kiev — USSR. Tutuzina manifestiĝo okazis en 1972 j. ĉe la gastado de la vjetnamaj poetoj-esperantistoj Dao Anh Kha kaj Nguyen Haj Trung, invititaj de la Societo. Freŝa en la memoro de ĉiuj estas la tutuzina mitingo de solidareco kun la batalo de la vjetnama popolo.

En novembro pasintjara pere de la uzina kulturdomo la Societo organizis sciencan konferencon je temo „Esperanto kiel helplingvo de la teknika informado“. Tiam bazan prelegon faris ing. Bojidar Leonov, estrarano de BEA.

En la uzina gazeto „Zavodsko Delo“ ofte aperas priesperantaj informoj. La societanoj preparas murgazetojn kaj montrofrenestrojn. La uzinaj gvidantoj rilatas tre favore al la E-Societo. La uzina sindikata komitato subvencias ĝian kulturan agadon.

Kiel prezidanto de la Societo elektiĝis k-do Petăr Nenov.

Ginka Popova

Sur la foto: Parto de la esperantistoj kun Esperantaj sloganoj antaŭ la ĵus inaŭgurita monumento de la pereintaj partizanoj apud v. Batulija.



AGRAbla KAJ UTILA EKSKURSO DE ESPERANTISTOJ

Dum la ripoztagoj ĉirkaŭ la festo de la Unua de Majo ĉ. j. ni, 18 sofiaj esperantistoj el diversaj E-societoj, faris ekskurson kun vojplano Sofio—Vidin—Belogradĉik — la groto „Magura“ — Sofio. La grupon gvidis k-do Oŝanski.

La veturado ĝis Vidin tute ne estis teda: oni multe kantis kaj babilis en Esperanto, ĝuis la belegajn panoramojn, kun intereso rigardis la nekonatajn lokojn, tra kiuj flugis nia vagonaro.

Ĉe la stacidomo de Vidin nin atendis lokaj esperantistoj ĉekape kun la E-veterano Georgi Simeonov. Ili ĝoje svingis la verdan flagon, prezentis al ni grandan bukedon de siringoj. La vidinanoj kondukis nin al turista dormejo. Ni lasis la pakojn kaj tuj eliris por vidi la urbon. Kondukate de k-do Simeonov ni kun granda intereso trarigardis la faman fortikaĵon „Baba Vida“, restintan el la mezepoko, „Stambul Kapija“, „Bazar Kapija“, la Moskeon de Pazvantogliu k. a. antikvaĵojn. Ni vizitis ankaŭ la muzeon de la unua bulgara ekzarko Antim I. Ĉi tie estas konservita tre interesa dokumento: letero de la ekzarko al la rusa caro Aleksandro II pri la suferoj de la bulgara popolo sub la otomana jugo kun peto pri helpo. Sur la letero estas rezolucio: „Liberigi Bulgarian.“

La sekvan tagon, ĝuste la Unuan de Majo, la grupo vizitis la novan kemian uzinon kaj poste la historian ŝipon „Radecki“, per kiu en 1876 j. la taĉmento de Bolev trapasis Danubon kaj venis en la patrolandon batali por ĝia libero. Lige kun la Internacia Festo de l' Laboro la junpioniroj estis ornamintaj la ŝipon per girlandoj de flagetoj de ĉiuj popoloj. Ludis sole-na muziko.

De Vidin ni forveturis al la famaj Rokoj de Belogradĉik, pro siaj majesteco kaj beleco unikaj en la mondo. Pri ili la franca vojaĝanto Blanki ravite skribas: „Nek la fama mallarĝa pasejo de Oliul en Provenco, nek la defilejo de Pankarbo en Hispanio, nek la Alpoj, nek la Pireneoj, Tirol kaj Svislando posedas ion, kion ili povus kompari kun tio, kion mi vidis ĉi tie — la Rokojn de Belogradĉik.“

Ĉiu roko estas ligita kun iu legendo, kreita de la popola fantazio, kaj havas sian nomon: „Hajdut Velko“, „La lernantino“, „La monaĥo“, „La monahino“, „La rajdisto“, „La sfinkso“, „La urso“, „Adamo kaj Eva“ k. a. Ni vere estis ravitaj de la vidaĵoj...

Per aŭtobuso ni atingis ankaŭ la majestatan groton „Magura“. Enirinte internen ni sentis

La grupo de la ekskursantoj en Vidin. Sur la fono estas videblaj turoj de la fortikaĵo „Baba Vida“.

nin kvazaŭ en mirakla fabela mondo: stalaktitoj, stalagmitoj, pentraĵoj de prahistoriaj homoj sur la muroj...

Plenaj de plezuro pro la viditaj mirindaj kreaĵoj de la naturo, de ĝojo kaj fiero pri nia bela kaj heroa patrolando, ni revenis de tiu neforgesebla ekskurso.

Vera Văjarova

NOVĀ ESTRARO DE IUEF

Fondita antaŭ 11 jaroj dum la 48-a UK de Esperanto en Sofio, la Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj (IUEF) evoluis kiel aŭtoritata scienca organizo tutmonda, en kiu nuntempe membras pli ol 170 filologoj el 14 landoj. Sub la gvidado de ties prezidanto Atanas D. Atanasov—vicprezidanto de la Esperanto-Akademio, la estraro de IUEF dumtempe disvolvis bonan laboron sur la filologia kampo kaj precipe pri la esperantologio. Dum tiu ĉi periodo ĝi aperigis 20 cirkulojn kun organiza materialo, kelkajn eldonaĵojn kun filologia enhavo kaj du adresarojn.

Ekde la komenco de sia ekzistado IUEF preskaŭ ĉiujare aranĝas en la kadro de la Universalaĵ Kongresoj de Esperanto fakajn kunvenojn kun organiza kaj sciencfilologia tagordo, en kiuj aktive partoprenas kongresanoj-filologoj. Ĉi-jare en la kadro de la 59-a UK de Esperanto en Hamburgo denove okazos renkontiĝo de la esperantistoj-filologoj, organizita de IUEF.

Je la fino de la pasinta 1973 j. la prezidanto de la Gvida Komitato de IUEF Atanas D. Atanasov kaj ties membro Rajna Konstantinova petis liberigon de siaj taskoj pro malsanado. Sekvis balotado fare de ĉiuj anoj de IUEF kaj estis elektita nova CK. En sia unua kunsido ĝi distribuis la taskojn inter la komitatanoj jene: prezidanto — Violin Oľianov, vicprezidanto — Kunĉo Vălev, kasisto-administranto



— Ljubomir Marikin, sekretario-protokolisto —
Marin Bâcev, korespondanto — Lilija Paršova,
bibliotekistino — Ljudmila Paspaleeva
(ĉiuj el Bulgario), membroj — Detlev Blanke
(DDR) kaj Simon Aarsen (Nederlando).

Interalie la Gvida Komitato decidis:

1. Estonte la cirkuleroj de IUEF aperu regul-
e trifoje en la jaro kiel kvarmonata bulteno
sub la nomo „Filologo“.

2. Gvidanto de la Sofia grupo de Esperan-
tistoj-filologoj plue restu la komitatano Kunĉo
Vălev — lektoro de Esperanto en la Sofia
Universitato.

La Gvida Komitato de IUEF alvokas ĉiujn
esperantistojn-filologojn kaj nefilologojn, sed
okupantajn sin pri filologiaj problemoj kaj
esperantologio, fariĝi regulaj aŭ kunlaboraj
membroj de IUEF.

La regulaj membroj de IUEF pagas membro-
kotizon de 12 respondkuponoj (aŭ egalvaloron —
pere de konvenaj libroj), kaj la kunlaboraj
membroj pagas nur la duonon.

La statuto de IUEF, aligilojn kaj pliajn
informojn oni povas ricevi de la GK de IUEF.
kies adreso estas:

Bulgario, Sofio, PK 66, IUEF.

ESPERANTO EN LA BULGARA GAZETARO EN 1973 J.

La Informa Servo de Bulgara Espe-
rantista Asocio dokumentas zorge ĉiujn
priesperantajn materialojn, aperintajn
en la bulgara gazetaro. Tamen de
multaj lokoj ni ne ricevas la nume-
rojn de la lokaj ĵurnaloj, kiuj enhavas
tiajn materialojn. En la lando aperas
573 ĵurnaloj kaj 601 revuoj kaj bul-
tenoj. La liston por 1973 j., kiun ni
publikigas ĉi-sube, entenas nur 33 ti-
tolojn. Ĉu vere nur en ili estas pries-
perantaj materialoj? Kion diros la E-
aktivuloj el la distriktaj centroj, la ti-
toloj de kies distriktaj ĵurnaloj man-
kas en la listo? Kion respondos la vig-
laj E-societoj en tiuj urboj kaj vilaĝoj,
kies urbaj kaj vilaĝaj ĵurnaloj ankaŭ
forestas en la listo? Ĉu la uzinaj E-
societoj kaj grupoj neglektas la uzi-
najn ĵurnalojn?

Ni bone scias, ke en 1973 j. en la

bulgara gazetaro aperis multe pli da
priesperantaj materialoj ol tiuj, kiujn
ni mencias en nia statistiko. Ni ape-
lacias al ĉiu esperantisto post konatiĝo
kun nia listo fari eblajn aldonojn
Aldonon vi faru ankaŭ pri la aperantaj
materialoj dum la kuranta 1974 j.
surbaze de la rubriko „Tra la gaze-
taro“ en „Bulgara Esperantisto“. Es-
tonte vi tuj sendu al ni ekzempleron
de la ĵurnalo aŭ gazeto, en kiu vi
aperigis aŭ simple renkontis priespe-
rantan tekston. Se ne eblas sendi
ekzempleron, vi informu nin per
poŝtkarto, menciante la titolon, la nu-
meron kaj la daton de la periodaĵo
kaj la titolon de la materialo.

Ĉion vi sendu al la asocia kancela-
rio, surskribante: „Por la Informa Ser-
vo“. Antaŭdankon!

(Sekvas sur p. 9)



*Jam pleniĝis 10 jaroj de oficiala
fakultativa instruado de Esperan-
to en la Sofia Universitato „Kli-
ment Ohridski“ sub la gvido de
lektoro Kunĉo Vălev. Dum tiu
tempo pli ol 500 gestudentoj lern-
is Esperanton en la grupoj.*

*Sur la foto: Lasta leciono,
majo 1974.*

*Eksterlandaj gesamideanoj sen-
du korespondproponojn al la
grupo. Komuna adreso: Kunĉo
Vălev, str. Ĉataga 5, Sofio 27,
Bulgario.*



Listo de bulgaraj periodaĵoj, kiuj aperigis priesperantajn materialojn en 1973 j.

Ĉefurbaĵ

a) Ĉiutagaĵ

Rabotniĉesko Delo
Veĉerni Novini
Oteĉestven front
Narodna Mladeŝ
Kooperativno Zelo

9
5
4
1
1

b) Aliaĵ

Uĉitelsko Delo
Pravna Tribuna
Sofijska Pravda
Literaturen Front
Narodna Kultura
Jar
Transporten Glas
Srednoŝkolsko Zname

3
3
2
1
1
1
1
1

c) Revuoj kaj bultenoj

Informacionen Buletin na Nacionalnija
Ŝavet za Evropejska Sigurnost i Sâtrud-
niĉestvo

2
1
1

Plamâk
Filatelen Pregled

Sume 37

Provincaĵ

Septemvriŝko Zname — Pazarĝik
Is kra — Kazarlâk
Oteĉestven Glas — Plovdiv
Narodno Delo — Varna
Zarĵa na Komunizma — Loveĉ
Trojanski Glas
Zname na Komunizma — Târgoviŝte
Ĉerveno Zname — Vidin
Dunavska Pravda — Ruŝe
Rodopski Ustrem — Smolĵan
Ŝunarska Zarĵa
Septemvriŝka Pobeda — Pleven
Septemvri — Bjala
Ĉernomorski Front — Burgas
Haskovska Tribuna
Kom — Berkovica
Asenovgradski Zov

7
6
4
4
4
4
3
3
2
2
2
2
1
1
1
1

Sume 49

Entute 86 materialoj

Laŭ karaktero la materialoj grupiĝas:

Artikoloj —	15	Mencioj —	11
Informoj —	46	Belartaĵoj —	2
Sciigoj —	12		

Informa Servo de BEA

25-jarojn Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo

LA SOCIALISMA EKONOMIA INTEGRIGO KAJ ĜIA ROLO POR PLIFORTIGO DE LA EKONOMIO DE PR BULGARIO

Jam pleniĝis 25 jaroj ekde la fondo de Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo (KEI). Tiu rimarkinda jubileo de la popoloj el la socialisma landaro estis solene festita en junio ĉi-jare en Sofio.

En KEI partoprenas la eŭropaj socialismaj landoj Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Sovetunio. Antaŭ 11 jaroj aliĝis Mongolio kaj en 1972 — Kubo. Sukcese evoluas la kunlaborado inter KEI kaj Jugoslavio rilate demandojn kaj problemojn de reciproka intereso.

Nun la landoj membroj de KEI estas monolita, dinamike disvolviĝanta industria komplekso kun pli ol 366 milionoj da loĝantoj. La landoj membroj de KEI nun havas 25% de la monda nacia enspezo kaj unu trionon de la

monda industria produktokvanto.

KEI estas kreita surbaze de suverena egaleco, sur la principo de amika interhelpo kaj reciproka utilo. Laŭstatute KEI helpas por unuigo kaj akordigo de la landoj, membrantaj en ĝi, por laŭplana evoluigo de iliaj naciaj mastrumoj, por certigo de ilia ekonomia kaj teknika progreso, por altigo de la nivelo de industriigo en la landoj kun malpli evoluinta industrio. Tiamaniere ĝi helpas por kreskigo de la ekonomia kuneco. En ĉiuj stadioj de la socialisma konstruado la landoj membroj de KEI larĝe kunlaboradas unu al la alia ekonomie kaj scienc-teknike.

En la kadro de KEI estas ellaboritaj bazaj dokumentoj, kiuj reguligas la ekonomiajn rilatojn inter la lan-



doj membroj. Estas akceptitaj bazaj principoj de la internacia socialisma divido de la laboro.

En la organoj de KEI oni traktas kaj solvas la demandojn de la scienc-teknika kunlaborado, ellaboras la principojn de la prezoformado en la socialisma merkato, akordigas la ekonomiajn planojn de la frataj landoj, realigas entreprenojn kiel la unuigitan energietikan sistemon „Paco“, la petrolkondukilon „Amikeco“ k. a. Enkadre de KEI funkcias diversaj internaciaj organizoj kiel Internacia Banko por Ekonomia Kunlaborado, Internacia Investa Banko k. a.

Nova grava stadio en la disvolviĝo de KEI estigis ĝia XXIII Speciala Sesio en 1969 j., kiun partoprenis la unuaj sekretarioj de CK de komunistaj kaj laboristaj partioj kaj la registaraj gvidantoj de la landoj membroj de KEI. Tiam estis fiksita ĝenerala direkto por la plua kunlaborado kaj komenciĝis firma kurso al socialisma integriĝo.

La XXV Sesio de KEI (1971) akceptis longedaŭran kompleksan programon por plua profundigo kaj perfektigo de la kunlaborado kaj disvolviĝo inter la landoj membroj de KEI. Tio estas dokumento kun ekskluzive grava signifo.

La socialisma integriĝo en la kadro de KEI havas grandegan ekonomian kaj politikan signifon por PR Bulgario. 98% el la eksporto de elektroĉaroj, 93% de elektraj levĉaroj, 95% de traktoroj kaj alia produktaĵo estas desti-

nitaj por la landoj membroj de KEI. Sur multflanka aŭ duflanka bazo en la kadro de KEI Bulgario specialiĝis pri multaj produktaĵoj. Tri kvaronoj de ĝia ekstera komerco efektiviĝas kun la landoj membroj de KEI. La specialiĝo kaj la kooperado en la kadro de KEI donis eblecon de pli ĝusta evoluo de Bulgario surbaze de grandseria altefika produktado de vico da fabrikaĵoj.

La socialisma ekonomia integriĝo realigas laŭ la principoj de socialisma internaciismo, de estimo al la ŝtata suvereneco, sendependeco kaj naciaj interesoj, de nenemikisigo en la internajn aferojn de la apartaj landoj, de reciproka utilo kaj amika interhelpo. Surbaze de la reciproka utilo la landoj membroj de KEI ne ĉesigas, sed male — daŭrigas kaj plivastigas siajn ekonomiajn kaj scienc-teknikajn rilatojn kun la nesocialismaj landoj — evoluantaj kaj evoluintaj.

La plej grava celo de la socialisma ekonomia integriĝo de la landoj membroj de KEI estas la iompostioma interproksimiĝo de la ekonomioj de la integriĝantaj landoj kaj egaligo de la niveloj de ties ekonomia disvolviĝo konekse kun la ĉefa celo de la gvidantaj partioj kaj registaroj en tiuj landoj — la senĉesa plialtigo de la popola vivnivelo. Tian celon povas starigi antaŭ si nur landoj, gvidataj de komunistaj kaj laboristaj partioj, profunde peneritaj de socialisma internaciismo.

La Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo estas brila ekzemplo de la internaciismo en la praktiko, esprimo de frata kunlaborado kaj reciproka fido inter landoj kaj ŝtatoj, kiuj havas unu saman celon — feliĉo de la homo kaj paco sur la tero.

HAIM LEVI



Sur la foto: E-kurso en Vidin sub la gvido de nia senlaca E-veterano Georgi Simeonov.

Devo de ĉiu esperantisto estas riĉevi kaj legi nian asocian organon. Individua abono ankoraŭ eblas. Abonu ĝin tuj! Abonigu aliajn!

Sub la supra titolo la bulgara esperantisto DIMITĀR DENĈEV aranĝis ekspozicion el fotoj de naturartaĵoj, kiuj vekas ĉe ni admiron. La fotojn faris li mem. Pli ol du jarojn tiu ĉi ekspozicio „migras“ tra la distrikto de Sofio kaj estas amase vizitata. Reprezentanto de nia redakcio intervjuis la aŭtoron de la ekspozicio.

Demando: Kiam venis al vi la ideo foti naturartaĵojn?

Respondo: Jam en junaĝo mi ŝatis verkojn de eminentaj pensuloj kaj verkistoj, kiuj majstre priskribis la naturon, kiel ekzemple la rusaj verkistoj Turgenev, Tjutĉev, Gorkij, Paustovski, nia nacia poeto Ivan Vazov k.a. Krom tio mi ricevis senperajn impresojn de nia Rila-montaro. Mi ja estas naskita en urbo Samokov, kiu situas ĉe la piedoj de Rila. Ekskursante tra la praarbaro, mi propraokule observadis arbojn, ŝtonojn, rokojn kaj faris komparojn, konkludojn. En daŭro de dudek jaroj mi fotografis interesajn naturfenomenojn. Iom post iom mi kolektis multe da fotoj, kiuj venigis min al la ideo pri ekspozicio.

Demando: Kiamaniere vi elektis la fotindaĵojn?

Respondo: Mia amatora laboro postulis de mi paciencon kaj persiston. Mi serĉadis miajn objektojn en montoj kaj riveroj, inter nuboj kaj vintraj neĝformadoj kaj precipe en la arbaro, kie la formoj estas ne nur plej ofte troveblaj, sed ili ankaŭ estas plej daŭraj, neŝanĝeblaj. Irante tra arbaro, mi atentis arbotrunkojn kaj branĉondojn, branĉojn, radikojn kaj aliajn, kiuj similas al homoj kaj homorganoj, al diversaj bestoj, birdoj, insektoj ktp. Elektinte tion, kio plaĉas al mi, mi ĝin fotografis.

Ĉe supraĵa observo la elektitaj de mi objektoj iam ŝajnas trivialaj. Mi tamen serĉas en ili tiajn elementojn, kiuj beligas ilin. Nur tiam ili fariĝas allogaj por la publiko.

Demando: Kie vi trovas tiom da interesaj objektoj?


Respondo: Interesaj laŭforme objektoj ofte estas troveblaj en la praarbaro,

en profundaj kanjonoj, kie la suno malfacile penetras kaj la vivokondiĉoj ne estas tre favoraj por la vegetaĵoj. Ĉe tiaj kondiĉoj la naturo kreas detalojn, kiuj efikas kiel artaĵoj.

Demando: Ĉu vi povas rakonti iujn interesajn epizodojn?

Respondo: Jes, kompreneble. Ofte, kiam mi kun la fotoaparato en mano ĵenas kapti interesan objekton, min ĉirkaŭas turistoj, kaj miras, kion mi faras. Iun tagon ekzemple min „sieĝis“ diversaĝaj turistoj, ĝuste kiam mi observis mian objekton — malgrandan radikon. Malantaŭ mia dorso oni komentis, ke mi kaŝatendas iun serpenton, kiu loĝas en la putra radikaro. Junulo supozis, ke mi atendas la eliron de iu muso aŭ skarabo. Nur unu el la gapantoj konjektis, ke mi volas fotografi raran radikformon.

Alifoje mi decidis foti maljunan salikon, starantan en la periferio de iu vilaĝo. Kamparanoj ĉirkaŭis min kaj la trunkegon de la saliko kaj longe observis, kion mi faras. Ili tamen ne suk-



cesis kompreni, kio al mi plaĉas. . .

Iun tagon, reveninte de la monto per aŭtobuso, mi portis surdorse tornistron, el kiu montriĝis seka branĉeto. Subite iu virino supozante, ke mi portas venenan serpenton, timigite aliris la konduktron kaj postulis de li forpeli min eksteren. Laŭ ŝi mi estis danĝera homo, simila al hinda serpentbridiganto... Vere, ĉiam validas la proverbo: tricent rigardas, nur tri vidas.



Demando: Ĉu vi estas kontenta pri la rezultoj de la ekspozicio?

Respondo: Multaj vizitantoj de la ekspozicio en diversaj lokoj enskribis siajn impresojn en la speciala kajero. Ĉiuj impresoj estas favoraj. Aperis ankaŭ artikoloj en la gazetoj, kiuj laŭdas mian ekspozicion. Evidente la amo al la naturo daŭras vivi en la koroj de multaj. Mi ĝojas, ke mia ekspozicio helpas al la homo pli penetre observi la naturon, kompreni ĝian neimageble riĉan vivon, ĝui ĝian belecon kaj esti pli pura, pli nobla, pli bela — kiel ĝi.

KOMUNIKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Daŭrigante sian pretigon de la 8-a „Oficiala Aldono al la Universala Vortaro“, kaj de la „Baza Oficiala Radikaro“, kiujn mi esperas povi publikigi baldaŭ en dua kajero de la „Aktoj de la Akademio“, la Akademio jam voĉdonis pri du gravaj punktoj kaj alvenis al decidoj jenaj:

1. La Akademio, post vastaj internaj diskutoj, malkonsilas la uzadon de la prepozicio *po* por esprimi la rilaton indikitan per la fraksi-streko en esprimoj kiel 30 km/h kaj similaj, kiel rektan eraron kontraŭ la ĝusta signifo de tiu prepozicio, difinita de Zamenhof en unua Lingva Respondo.

Manke de specifa prepozicio por tia uzado, la Akademio lasas liberecon al fakuloj elekti inter la prepozicioj *en*, *je*, *por* aŭ *sur*, laŭ la cirkonstancoj, aŭ uzi adverbajn formojn, kiel „30 kilometroj(n) hore“.

2. La Akademio, konsiderante, ke la Lingva Komitato, kiam ĝi en 1922 malkonsilis la enkondukon de la sufikso *-io* por formi landnomojn, baze sian decidon sur la konstato de la tiama uzado;

konstatante, ke nuntempe, malgraŭ tiu oficiala malkonsilo, la uzado de tiu sufikso *-io* ne malkreskis, sed, male, disvastigis;



Taragono — Hispanio, 11 — 17. V. 1974

En la mateno de la 11-a de majo ĉe la stacidomo de Port Bou — la limo inter Francio kaj Hispanio, alvenis tri internaciaj vagonaroj kun kelkcentoj da esperantistoj el ĉiuj partoj de Eŭropo. Ĉiuj veturis al la IFEF-kongreso en Hispanio.

Tuj vidigis la tradicia bona organizo de tiuj kongresoj: membroj de LKK atendis nin ĉi tie, ĉe la limo, preskaŭ 200 km malproksime de la kongresurbo Taragono. Tien oni veturigis nin per speciale kombinita por ni „Esperanto-ekspreso“, riĉe ornamita per Esperantaj afiŝoj kaj flagoj. Dum oni atendis la lastan vagonaron el Francio, jam kreiĝis la familia atmosfero, tiel kutima por la kongresoj de la esperantistoj-fervojistoj! Komenciĝis ardaĵ bonvenigoj, salutoj, unuaj konatiĝoj, viglaj interparoloj, kiuj daŭris ne nur dum la kelkhora veturado per la vagonaro, sed ankaŭ dum la tuta kongreso. Specialaj aŭtobusoj rapide veturigis nin al la kongresejo je ĉ. 5 km ekster la urbo. Ĝi situas en bela vasta parko.

Dimanĉe — la inaŭguro de la kongreso. Ĉeestis 648 el 17 landoj. El nia lando — ĉ. 30 personoj.

La kongreson oficiale salutis la urbestro s-ro R. V. Guix kaj aliaj oficialaj reprezentantoj.

Kaj jen granda surprizo: en la kon-

gresejon eniris grupo da studentoj el la Laborista Universitato de Taragono. Kantante kaj ludante je gitaroj ili promenis inter la kongresanoj en siaj ĉarmaj folkloraj vestaĵoj kaj kreis veran atmosferon de malnova Hispanio. Sekvis salutoj de la landaj reprezentantoj. Kaj refoje ĉe la finiĝo de la malfermo la folkloro grupo plenumis belan programon. Poste — komunaj fotoj en la parko.

La saman tagon posttagmeze okazis la unua ekskurso tra la urbo kaj veturado al San Paul de Ordal, kie okazis la inaŭguro de Muzeo de Esperanto. La domo por la muzeo estas donacita de la entuziasma esperantisto Luis M. Hernandez Jzol. La strato, kie ĝi troviĝas, estas nomata „D-ro Zamenhof“. La muzeo enhavas valoran materialon, precipe librojn kaj gazetojn ekde la apero de Esperanto. En la konstruaĵo estas ampleksa salono por biblioteko, oficejo, laborĉambro por la direktoro, salono por ekspozicioj, akceptejo por vizitantoj, magazeno por duoplaĵoj ktp.

Lunde — la trian tagon de la kongreso, kunsidis la komitat-estraro. La plimulto de la kongresanoj vizitis la vidindaĵojn de Taragono. La urbo estas tre interesa, ĉar en ĝi varias plej malproksima antikveco kaj elstara moderneco. Ĝi atingis gloron

memorante la vojon, indikitan de Zamenhof en la Antaŭparolo al la Fundamento por ebligi senrompan evoluon de la lingvo, kaj konsistantan en la propono de formo nova, uzebla paralele kun la malnova formo;

opinias, ke la uzado de la sufikso -io apud la fundamenta -ujo por ricevi

pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de tiu Zamenhova uzado;

kaj, nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.

G. WARINGHIEN

La Prezidanto de la Akademio

Vitry, la 4-an de febr. 1974



kiam la romia generalo Scipiono faris ĝin centro de siaj militiroj kontraŭ la kartaganoj. Tiam ĝi fariĝis ĉefurbo de romia Hispanio, pro kio ĝis nun restis kiel unu el la plej aŭtentikaj urboj-muzeoj, kiuj konservas eksterordinarajn monumentojn. Vespere okazis la korigresa bankedo kaj la internacia balo. Marde, la 14-a de majo, estis tago de kunsidoj — Terminara Komisiono, Junulara Komisiono, fakaj vizitoj kaj duontaga ekskurso al la urbo, kie troviĝas konstanta Fervoja Ekspozicio.

La saman vesperon la elstaraj geaktoroj de la Bulgara E-Teatro Belka Beleva, Anani Anev kaj Minail Ĉobanov prezen-

tis la 3-aktanitan alian komedion „La rozoj“ de Aldo de Benedetti. Tiu arda vespero fariĝis la kulmino de la kongreso. La rolado de la aktoroj elvokis profundan kontenton. Je la fino la publiko salutis niajn geaktorojn per tondraj aplaŭdoj. Salutis ilin ankaŭ LKK kaj la estraro de IFEF.

La sekvan tagon dum la plenkunsido la prezidanto de IFEF s-ro Giessner deklaris: „Mi ĝojas, ke mi povas estiĝi esprimanto de la komuna opinio, ke la spektaklo de la bulgaraj aktoroj estis la plej impona kultura okazintaĵo dum nia kongreso. La ludado de ĝesinjoj Beleva, Anev kaj Ĉobanov

(Sekvas sur la III kovrilpaĝo)

LINGVAJ DEMANDOJ

EDUKO DE LA ORELO. MEKANISMO DE LA ELPAROLADO

Daurigo de la artikolo de *prof. d-ro Stojan Ĝuĝev* el n-ro 5

La elparolado estas akto preskaŭ senkonscia kaj apartenas al la kategorio de l' aŭtomatismoj. Sed antaŭ ol fariĝi aŭtomatismo, ĝi konsistas el serio de multnombraj provoj, ekzercoj, konsciaj agoj.

Kiam ni parolas nian gepatran lingvon, ni neniam pensas pri la maniero, laŭ kiu devas fiksi aŭ movigi niajn parolorganojn, ni ne atentis *kie*, en kiu punkto la pinto de la lango devas tuŝi la dentojn, la alveolojn aŭ la palaton, kiom ni devas eltiri aŭ kunigi (rondigi) la lipojn, kian angulon devas formi la makzeloj k. t. p. Ni pensas precipe pri la enhavo de nia parolo, pri la *signifo* de la vortoj, pri la konstruo de la frazo, pri ordigo de la ideoj. Sed la funkciado de la parolorganoj, la *artikigo* de ĉiu sono, vorto aŭ frazo estas akto aŭtomata, senkonscia. Pruvo pri tio estas la fakto, ke ni ne ĉiam, eĉ preskaŭ neniam aŭskultas nian propran voĉon, kiam ni parolas, kaj ofte ne rimarkas la „glitojn“ de la lango,

t. e. la senkonsciajn erarojn de artikigo, kiujn ni faras dum la parolado.

Sed, kiam ni parolas en fremda (negepatra) lingvo, kiun ni ankoraŭ ne bone majstras, kaj kia por la plimulto de ni estas la lingvo Esperanto, la mekanismo de elparolado estas tute alia. Tiam la prononcado ankoraŭ ne aŭtomatigis, kaj ni devas pensi pri la artikigo de ĉiu aparta vorto, silabo aŭ sono, pri la pozicio de la lango, de la buŝo, de la dentoj k. c.

Kiam oni lernas paroli fremdan lingvon, oni provizore devas forviŝi en sia konscio la parolkutimojn de la malnova (gepatra) lingvo kaj krei en si mem novajn artikigajn kutimojn, kiuj post pli-malpli longa ekzercado transformiĝos en novajn aŭtomatismojn.

Por akiri *korektan*, t. e. facile kompreneblan elparolon, resp. artikigon en Esperanto, oni povas rekomendi al la novaj esperantistoj kaj precipe al tiuj, kiuj nun lernas la Internacian Lingvon — tute sendepende de la nacieco, al kiu



ili apartenas — la sekvantan preparan laboron:

A. *Esploro de sia fonetika konscio.* La unua laboro, kiun ĉu kursano aŭ memlernanto de Esperanto, ĉiu nova esperantisto kaj multaj malnovaj esperantistoj devas plenumi por la ekposedo de bona, korekta Esperanta elparolo, konsistas en ekzameno de sia propra fonetika konscio. Alivorte, li devas starigi la bilancon, la kreditandebetan konton de sia fonetika bonhavo (posedaĵo), t. e. de la sonoj (fonemoj kaj „alofonoj“), kiujn li majstras (posedas) en la fonologia sistemo de sia gepatra etna lingvo, kaj de la sonoj, kiuj mankas en lia nacilingva fonologia sistemo, sed ekzistas en la fonologia sistemo de la nova studata lingvo (Esperanto). Ĉiujn fonemojn de la unua kategorio li devas registri en la konton „kredito“ kaj ĉiujn fonemojn de la dua kategorio li devos registri en la konton „debeto“.

B. *Inventariigo de la tuta stoko de fonemoj en sia fonetika konscio.* Ni supozu, ke germano lernas Esperanton. Ekzamenante sian fonetikan konscion kaj komparante la diversajn sonojn de sia gepatra lingvo kaj de la nove lernata lingvo (ekz. Esperanto) li povos klasigi ĉiujn sonojn de ambaŭ lingvoj en kvar kategoriojn:

1. La unua kategorio enhavas la sonojn komunajn en ambaŭ lingvoj. Tiuj ĉi sonoj prezentas nenian malfacilaĵojn.

2. La dua kategorio enhavos la novajn sonojn, t. e. la sonojn (fonemojn), kiuj ekzistas en Esperanto, sed mankas en lia nacia lingvo. Tio estas la sonoj, kiujn li devos akiri. Laŭ Ch. Bruneau, kontraŭe al la ĝenerala opinio, la akiro de unu nova sono estas tasko relative facila kaj relative rapida.¹

3. La tria kategorio ampleksos ĉiujn sonojn, kiujn li devos korekti, t. e. la sonoj (fonemoj), kiuj ekzistas en ia malsama formo (variaĵo, alofono) en lia fonetika konscio, sed en kelkaj detaloj pli aŭ malpli diverĝas, deflankiĝas de la Esperantaj modeloj. Ekz. la fonemo *l* por bulgaroj.

4. En la kvara kategorio li klasos la sonojn, kiuj ekzistas en lia nacia lingvo, sed mankas en Esperanto. Tiuj sonoj havas nenian rilaton al Esperanta prononco kaj povas esti simple neglektitaj.

C. *Ekposedo de la sonoj el kategorioj 2 kaj 3.* Tiujn sonojn ia nova esperantisto povos ekmajstri laŭ du vojoj: 1) Per imito de trafikaj modeloj (troveblaj sur bendoj, diskoj aŭ en la vivanta parolo de lertaj esperantaj oratoroj, aktoroj aŭ personoj, kiuj majstras la parolan lingvon). 2) Per difino de la artikigaj movoj (la „kinemoj“), kiujn devas plenumi la parolorganoj por prononci (sonigi) la fonemojn. La kompara metodo tie ĉi donas kontentigajn rezultojn. Ni komparu, ekzemple, la anglan sonon „t“ de la vorto „tea“ kaj la Esperantan sonon „t“ de „teo“. La angloj emas prononci la esperantan sonon „t“ de „teo“ laŭ la sama maniero, laŭ kiu ili elparolas la anglan sonon „t“ de la vorto „tea“. Nu, la angla sono „t“ estas artikigata per la pinto de la longo apogita sur la antaŭpalato kaj estas *akompanata* per forta elspira aerfluo. Tial ĝi similas al la Esperanta „ĉ“, kaj oni kvazaŭ aŭdas „ĉeo“, „ĉri“ k. c. Per komparo al bonaj modeloj oni povas forigi tiun difektan elparolon.

La korekto de la „similaj“ fonemoj postulas streĉon de la atento kaj ekzercon de artikigaj organoj. La natura inerteeco de la parolorganoj (kiuj jam akiris la kutimojn de la nacilingvaj fonemoj) kaj la nesufiĉa klareco de la grafikaj signoj (literoj) estas la ĉefaj kaŭzoj de eraroj.

¹ Ch. Bruneau, Manuel de Phonétique, Paris, 1931, p. XIX).

(Fino)



VERDAJ STELETOJ

Gastas al ni „Informado el Vjetnamio“ — oficiala organo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, n-ro 3—4/1973.

UNU EKZEMPLODONA PIONIRO


Iun somertagmezon Dinh Viet Ba iras al fiskaptado. Li ripozas sur la digo, kiam subite li aŭdas iun fali en la akvon. Turniĝante Ba vidas etan kapon de infano surface kuntrenatan de la fluo. Li sin ĵetas en la riveron kaj kun multe da peno sukcesas revenigi la viktimon al la bordo. Estas neniu alia ol la eta Luc, el la sama vilaĝeto. Ba revivigis lin per artefarita spirado kaj kondukis lin hejmen.

Ba estas ankoraŭ konata pro pluraj aliaj bonaj agoj. Oni ofte vidas lin transporti pezajn ŝarĝojn helpe al maljunuloj, puŝi ĉarojn kun la soldatoj, pisti rizojn por la familioj de tiuj, kiuj oferis sian vivon por la patrio, kaj ankaŭ de militvunditoj, prizorgi la novplantitajn arbojn ĉe la vojebordo ktp.

Dinh Viet estas lernanto en la 6-a klaso de la mezgrada lernejo de Mai Son (komunumo Tat Thang, distrikto Nong Cong, provinco Thanh Hoa). Li estas amata de tuta sia vilaĝo. Proponite kiel la „bonkondata nepo de Onklo Ho“ de la provinco Thanh Hoa, li estis elektita por partopreni en somerferia tendaro, organizita por la pioniroj en la Mongola Popola Respubliko.

La kovrilpaĝo

Tran Van Tam, la kvinjara premiito per ora medalo ĉe la Tutnorda Arta Konkurso, kun sia unukordo.



LA SUNO

Naskite de la tero,
la suno aperas super la maro.
En ĝia ondo-lulilo kiom da brilegaj radioj!
La nuboj faras al ĝi purpuran fulardon,
kaj jen ĝi diras adiaŭon al sia patrino
kaj prenas sian flugon!

Neniu amas sian patrinon
tiom, kiom la suno la teron.
Ah! La ardaj kisoj, al ĝi donitaj,
la kisoj, kiuj plutenas varmon en la koro,
kiam la nokto jam falas!
— Neniam mi ekdormas, panjo,
eĉ kiam la nokto etendas sian vastegan vualon.

En Truong Son¹ la suno ĉiu momente aperas.
La kamionoj alportas ĝiajn radiojn al la fronto,
obusojn, kiuj bruligas aviadilojn,
fulmojn, kiuj traboras la obskuron,
brulantajn korojn, kiuj serĉas la malamikon!


Pro amo al sia patrino
la suno neniam estingiĝas!

*Hoang Huu Nhan
11-jara vjetnama infano*

¹ Montaro en Vjetnamio.



VORTPLEKTAJO



(el paĝo

estis je la plej alta arta kaj lingva nivelo. Tiu prezentado restos kiel plej agrabla memoro en mia konscienco.“

Ankaŭ en la oficiala bulteno de la kongreso la ludo de niaj geaktoroj estis tre alte taksita.

Paralele kun la varia distra programo la kongreso devis ankaŭ solvi siajn taskojn. Unuanime kiel reprezentanto ĉe UEA reelektiĝis d-ro I. Bacskaï. Estis akceptitaj la raportoj pri Aarhus-la sekretaria kaj kasista raportoj. Kun maksimuma nombro de voĉoj, elektiĝis estraranoj: prezidanto J. Giesner, vicprezidanto W. v. Loouwen, sekretariino E. Kruse, kasisto H. Hauge kaj redaktoro G. Delaquaizo. Gvidantino de la junulara sekcio fariĝis f-ino M. Morlani el Italio. En 1975 j. la kongreso okazos en Villach, Aŭstrio, de la 10—17 de majo, kaj en 1976 — en Skellefteaa, Svedio.

Malfrue vespere okazis la „forumo“ — simila al kunveno sen oratoro: la kongresanoj rajtis starigi fakajn demandojn kaj elstaraj hispanaj esperantistoj laŭpove respondis.

1. Kunigaĵo da paperfolioj necesa por ĉiu lernanto. 2. Korpaj ekzercoj aŭ ludoj. 3. Hom-aspekta aŭtomato. 4. Vojaĝi transportate per diversaj rimedoj. 5. Ĝi apartigas kontinentojn. 6. En la tago post la hodiaŭa. 7. Ĝin oni sendas al eksterlanda amiko. 8. Per ĝi oni skribas. 9. La plej serĉata persono en la lernejo. 10. Tago de la semajno. 11. Monato, kiam oni ne iras al lernejo. 12. Ĝi havas la econ altiri iujn metalojn, precipe feron. 13. La plej amasa sporto per piedpilklo.

Marin Băcev

La ĵaŭdo estis tago de la junularo. Faris impreson, ke tiun kongreson partoprenis multaj gejunuloj. Ankaŭ ilia programo estis streĉa: krom la kunsidoj estis futbalmatĉo, pikniko, teatraĵoj, la tradicia junulara balo.

Dum tiu tago la urbestro de Taragono akceptis la delegitojn kaj la geaktorojn de BET.

Vendrede, la lastan tagon de la kongreso, okazis tuttaga ekskurso al San Sadurni, Montserat kaj Valls.

Kaj jen — ĉiu komenco havas finon. Alproksimiĝis la majesta momento, kiam la prezidanto de IFEF devis fermi la kongreson.

Lasta kunveno. Alpaŝas la reprezentanto de Aŭstrio, kiu akceptas la kongresan standardon kaj promesante bonan organizon de la sekvanta 27-a Kongreso de IFEF elkore invitas ĉiujn partopreni ĝin en la bela apudlima urbo Villach.

La sekvan tagon, sabate matene, la speciala „Esperanta-Ekspreso“ veturigis la kongresanojn al Barcelono — iujn por partopreni la postkongresan ekskurson, aliajn — direktiĝi al siaj domoj.

Marin MARINOV

Redakta Komitato: Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BĀCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krĉstju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario: Minko CONKOVSKI

Teknika aranĝanto: Prodan PRODANOV

Korektis: Vasja PETROVA

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Solvo de la krucvortenigmo en n-ro 1—2/74

Horizontale: 1. pina; 2. enue; 3. aks; 8. rr; 9. el; 10. teo; 11. rubo; 13. abon.

Vertikale: 1. pes; 2. in; 3. nure; 4. aero; 6. aera; 7. klub; 10. bo.

TELEVIDA FILMO PRIESPĖRANTA EN POLLANDO

La 28-an de oktobro 1973 la Pola Televido prezentis la 33-minutan filmon „Por ke la homo komprenu nin“. La filmo estas dediĉita al D-ro L. L. Zamenhof, al la Internacia Lingvo kaj al esperantista movado en Pollando.

Al la televido venis multaj leteroj, esprimantaj dankon pro la filmo kaj sugestantaj enkondukon de televida E-kurso. La elsendo de la filmo kongruis kun apero de multaj informoj pri la korespondaj kursoj de la Ĉefa Estraro de PEA, kiujn publikigis la centra kaj regiona gazetararo de Pollando. Rezulte, al la oficejo de PEA alvenis pli ol 3000 leteroj kun demandoj pri Esperanto kaj pri la ebloj lerni ĉi tiun lingvon. Pli ol 1000 personoj el inter la demandintoj aliĝis al la korespondaj kursoj kaj komencis la lernadon.

El „Pola Esperantisto“ n-ro 5—6/73

TRA LA GAZETARO

En n-ro 1/1974 de la monata revuo „Filatelien Pregled“, organo de la Asocio de Bulgaraj Filatelistoj: informo „La agado de la Klubo de Esperantistoj-Filatelistoj“ de Ljubomir Levčarov.

En la uzina ĵurnalo „Zavodsko Delo“ — uzino „Balkan“ en Loveĉ (8. III. 1974): foto de Esperanto-kurso en la uzino.

En ĵ. „Dunavsko Delo“, u. Svištov (21. III. 1974) du informoj: „Nacia Junulara Esperanto-Konferenco en Svištov“ de Linlin Zanol — pri la tutlanda studenta E-konferenco de la 16—17 de marto ĉ. j. en la urbo kaj „Amikoj tra tutmondo“ de Sider Denev, prezidanto de la loka E-Societo „Danuba Stelo“ — pri la vigla internacia korespondado de la esperantistoj el la kemia uzino en la urbo. La ricevataj leteroj estas vaste uzataj propagandecle.

En ĵ. „Oteĉestven Zov“ — Vraca (25. III. 1974) en la speciala E-rubriko: „12-jarojn lernejana E-Societo „Verda Raketo“, „Esperanto kaj filatelo“ — artikolo de Maria Ganĉeva (lernantino), „Kiel ni korespondas?“ — artikolo de Rumjana Pavlova (lernantino) pri la spertoj de l' anoj de „Verda Raketo“ en la internacia korespondado.

En la sama ĵurnalo (19. IV. 1974) en la E-rubriko: „Esperanta mezaiko“ enhavanta g

pecojn. Elektis la materialojn Emilija Stojanova, Neli Slavejkova kaj Margarita Prestojaska.

En ĵ. „Zarja na Komunizma“ — Loveĉ (26. III. 1974): informo pri nova uzina E-societo en unuiĝintaj uzinoj „Balkan“.

En ĵ. „Podem“ — u. Polski Trâmbeŝ (27. III. 1974): artikolo de Ĥristo Manolov pri la sukseplena ekspozicio de pentraĵoj de la esperantisto Prodan Prodanov el Sofio.

En ĵ. „Veĉerni Novini“ (1. IV. 1974) — pri la okazinta tuturba kunveno de la Sofia esperantistaro, en kiu parolis reprezentantoj de la esperantistoj el GDR, Pollando, USSR, ĈSR, Hungario.

En ĵ. „Rabotniĉesko De'lo“ (29. III. 1974): artikolo „La partizana kuracisto kaj politika komisaro“ de Petr Panajotov — pri la pereinta en la kontraŭfaŝista batalo d-ro Várbán Genĉev, esperantisto, ligo kun la 30-a datreveno de lia perejo.

En la sama ĵurnalo (2. IV. 1974): informo pri la kunsidoj de la IV-a Konsulta renkontiĝo de gvidantoj de la E-organizaĵoj en GDR, ĈSR, Hungario, Pollando, USSR kaj Bulgario.

En ĵ. „Oteĉestven Front“ (30. III. 1974) en la E-rubriko „Esperanta Globo“: artikolo „Eminentia soveta sciencisto“ de Nano Kjuĉukov, estraro de BEA — pri la forpasinta esperantisto prof. Evĝenij Bokarjov okaze de la 70-a datreveno de lia naskiĝo; informo pri la Bulgara Esperanto-Teatro; informo pri la inaŭguro de monumento de d-ro L. L. Zamenhof en u. Prilep, Jugoslavio.

En la sama ĵurnalo (2. IV. 1974): informo pri la okazanta en u. Kazanlák festo de la Esperanta revolucia poezio kaj kanto, dediĉe al la 30-jara jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario.

GRAVAJ PERIODAĴOJ EN USSR KAJ GDR PRI ESPERANTO

La ĵurnalo „Krasnaja Zvezda“, centra organo de la Ministerio de Defendo de USSR, aperigis (20. III. 1974) en la rubriko „Scienco kaj tekniko“ artikolon de A. Pahomov pri Esperanto, responde al demando de legantoj. La aŭtoro emfazas la ideon pri internacia helplingvo, substrekkante ĝian solvon (kvankam iom rezervite) per Esperanto. Abundas informoj pri la E-literaturo kaj gazetararo, pri UEA kaj aliaj E-organizaĵoj. La artikolo finiĝas per favora eldiro de Magomet Isaev, d-ro de lingvistikaj sciencoj, estro de la Lingvistika Sekcio ĉe Instituto de Lingvistiko en USSR.

*

La popularscienca revuo „Urania“ — GDR (majo 1973) presigas artikolon pri Esperanto — deveno, esenco kaj praktika uzo. Aŭtoro estas Detlev Blanke, sekretario de la Centra Laborrondo Esperanto en la Germana Kulturligo de GDR.